

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:

La mondo me-
moros Leonid Brejnev!...

•
USSR—bastio-
no de la paco


•
Domo-muzeo
de Hristo
Popov

•
E-palaco en
Pisnica

•
Originala
E-verkaro

•
Enlanda
movado

•
Tra la mondo





ETERNE EN NIAJ KORJOJ

La sciigo pri la subita forpaso de la ĝenerala sekretario de Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio kaj prezidanto de la Prezidio de l' Supera Konsilio de USSR Leonid Iliĉ Brejnev traflugis nian landon kaj premis dolore ĉies korojn.

Forpasis la granda kaj fidela amiko de la bulgara popolo, trifoje Heroo de Popola Respubliko Bulgario, laŭreato de Dinitrov-premio por paco, demokratio kaj socia progreso.

En Madrido hispana diplomato karakterizis Brejnev kiel patron de la malstreĉigo, en Prago oni nomis lin granda filo de grandega popolo, en Novjorko — unu el la plej eminentaj ŝtatestroj de nia tempo, en Budapeŝto — konsekvenca, pasia kaj nelacigebla batalanto

por la ideoj de paco kaj socia progreso, en Berlino — giganto de la penso kaj faro...

En la rava personeco de Leonid Brejnev speguliĝas nia revolucia nuntempo. Liaj faroj vivas en la dinamiko de nia marŝo antaŭen, en la senĉesa revolucia renovigo de la mondo.

Pasos jaroj, jardekoj... La vivo iros antaŭen, ŝanĝiĝos. Aperos novaj problemoj kaj eventoj. Sed la teoria kontribuo, la praktikaj solvoj kaj la persona ekzemplo de Leonid Iliĉ Brejnev faros lin vivanta partoprenanto en niaj estontaj laboro kaj batalo. Ĉar li apartenas al la plejado de tiuj historiaj personecoj, pri kiuj oni pensas kaj parolas en aparta verbotempo — kaj en pasinta, kaj en nuna, kaj en estonta.

Leonid Brejnev restos kara kaj proksima al ni ĉiuj kaj ankaŭ al multaj estontaj generacioj — kiel eminenta ŝtatestro kaj kiel homo — homo kristale pura, kun granda persona ĉarmo, principa, sincera kaj justa, kun klara kaj realisma rilato al la faktoj, eventoj kaj problemoj, kapabla ĝustatempe vidi la malperfektaĵojn kaj proponi la ĝustan vojon por ilia forigo.

Por ni la bulgaraj esperantistoj la personeco, la ideoj kaj la faroj de Leonid Brejnev estas aparte karaj kaj proksimaj. Li estis la plej populara ŝtatisto kaj adepto de la ideo por paca kunvivado dum la lastaj du jardekoj. Por esti indaj por liaj faroj, por konservi la rememoron pri li, ni devas ankoraŭ pli efike apliki la Internacian Lingvon en la batalo por monda paco kaj internacia amikeco, por tutmonda progreso kaj feliĉo.

ASOCIO DE SOVETAJ ESPERANTISTOJ

PROSPEKT KALININA 14 SSOD

SU — 103009, MOSKVO

Karaj kamaradoj,

Ni sofiaj esperantistoj oficantaj en CE de BEA kaj en la urba kaj distrikta estraroj de BEA en Sofio, kolektiginte en funebra kunveno, esprimas nian profundan kondolencon al vi, sovetaj fratoj kaj fratinoj. Dum tiuj pezaj horoj ni estas kun vi. Ni sincere dividas vian doloron kaj malĝojon pro la grandega perdo — la morto de Leonid Iliĉ Brejnev.

Ni uzu ankoraŭ pli aktive nian lingvon Esperanto por reale kontribui al la triumfo de liaj noblaj ideoj pri internacia amikeco, tutmonda paco, tuthomara progreso kaj feliĉo!

DE LA KUNVENO



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

NOVEMBRO

11 • 1982

BASTIONO DE LA PACO

NIKOLA ALEKSIEV,

Heroo de la Socialisma Laboro

En la moderna historio de l'homaro ekzistas evento, al kiu oni ne povas rilati indiferente: ĝi estas la socialisma revolucio en Rusio, okazinta je la 7-a de novembro 1917 (25-a de oktobro laŭ malnova stilo, de kie devenas la oficiala nomo de tiu ĉi evento — Granda Oktobra Socialisma Revolucio).

Ci-jare oni festas la 65-jaran datrevenon de la Oktobra Revolucio kaj la 60-jariĝon de la unua en la mondo socialisma ŝtato — jubileo, kiu altiras la atenton tiel de la amikoj kiel ankaŭ de la malamikoj de Sovetunio. La fiaskigo de la malnova sociordo de tiu grandega lando kaj la proklamo de soveta regado estas la plej rimarkinda evento de nia jarcento.

Ciuj provoj de la organizantoj de l'interveno de 14 gvidaj ŝtatoj, fronte kun Usono frakasi la novan socialisman ŝtaton restis senrezultaj. Ne estas iu ajn serioza ŝtatisto, kiu ne sentas la neceson serĉi komunan lingvon kun Sovetunio en la solvado de la plej gravaj mondaj problemoj. Ni ne parolas pri aventuristoj, kiuj sendepende de sia koloro ĉiam estas miopaj malrealistoj kaj finfine fiaskos grandioze. La ekzemplo de Hitler — tiu plej granda aventuristo en la nova historio — sufiĉas por emfazi la malgloran sorton de ĉiu lia epigono.

Troviĝas ankaŭ kaj balbaŭ ne elĉerpigos la provoj nei la decidan rolon de Sovetunio en la fiaskigo de Hitler-Germanio kaj la savo de la popoloj el sub la „miljara Tria Regno“ de la germana faŝismo. Tiuj kvazaŭhistoriistoj kaj plorindaj ĵurnalistoj ne havas kuragon citi la pritakson de la rolo de Sovetunio fare de la plej respondecaj okcidentaj ŝtatestroj kaj ties generaloj, faritan dum la Dua Mondmilito, iniciatita de Hitler kaj la starantaj post li reakciuloj. La historiaj faktoj restas kaj influas la realan marŝon de la eventoj eĉ kiam la falsigan-

toj de la faktoj delonge estas forgesitaj. Provizore oni povas pli malpli erarigi la homojn. Sed la reala vivo tute ne interesiĝas pri la elpensadoj de la internaciaj falsigantoj kaj finfine senmaskigas ilin. Venkis ĉiam nur la principa politiko, ĉar al ĝi apartenas la decida venko.

Dum la 65 jaroj pasintaj post la 7-a de Novembro 1917 multaj „profetoj“ ridindigis. Sed restas tre elokventa fakto — neniuj alia ŝtato krom Sovetunio faris tiom multe da konkretaj proponoj por konservo de la paco, por malmarmado, por paca kunekzistado de ŝtatoj kun malsama sociordo, por sekureco de ĉiuj popoloj. Tiuj proponoj estas tiel forte argumentitaj, ke vole-nevole eĉ plej grandaj malamikoj de Sovetunio el la okcidentaj ŝtatestroj estis devigataj de la publika opinio en siaj propraj landoj kaj en la mondo akcepti ilin. La grandega plimulto de la membro-ŝtatoj de l'Unuiĝintaj Nacioj aprobas ilin senrezerve. Kaj tiuj malmultaj impertinentaj reakciuloj-aventuristoj, kiuj malaprobis ilin, nur demonstras sian malkapablon ĉerpi lecionojn el la historio. Fruemalfrue similaj „politikistoj“ trovas sin antaŭ plena fiasko.

Sovetunio estas aŭtoro de pluraj proponoj de unuagrada graveco por ĉiuj ŝtatoj senescepte: pri limigo kaj laŭgrada neniigo de amasmortigaj rimedoj, pri malpermeso de la eksperimentoj per nukleaj kaj bakteriologiaj militrimedoj, pri ĉesigo de la vetarmado, kunvoko de monda konferenco pri malmarmado ktp.

La monda publika opinio devas tre serioze apliki premon al similaj egoistaj politikistoj kaj devigi ilin honeste rilati al la pacproponoj de Sovetunio en intereso de la tutmonda paco.

La 60-jariĝo de Sovetunio estas salutata de ĉiu sincera pacadepto, kiu vere strebas al daŭra kaj justa paco sur la Tero.

En la tridekaj jaroj en Bulgario aperas du revoluciaj esperantaj gazetoj: „Mejdunaroden Ezik“ („Internacia Lingvo“, 1931—1932) kaj „Mejdunaroden Rabsekor“ („Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, 1932-1934).

Tiutempe la bulgaraj laboristoj kaj vilaĝanoj deziras scii la veron pri la vivo en Sovetunio, tiel zorge kaŝatan kaj misprezentatan de la burĝa gazetaro. La registaroj de Andrej Ljapčev kaj la koalicio „Naroden Blok“ („Popola Bloko“) kruele persekutas ĉian agitadojn por la sendo de laborista delegitaro en USSR.

La temo pri Sovetunio okupas centran lokon en la esperantaj eldonoj de tiu historia periodo. En la 23 numeroj de „Mejdunaroden Ezik“ la publikadoj pri la soveta vivmaniero estas 28, kaj en la 35 numeroj de „Mejdunaroden Rabsekor“ — inter 150 kaj 200. Preskaŭ entute numero 10-11 de „Mejdunaroden Rabsekor“ de la 30-a de aprilo 1933 prezentas diversajn flankojn de la soveta vivo. Dek unu presadoj kaj 12 fotoj rakontas pri la sukcesoj de la soveta homoj en konstruado de la socialismo. Interesaj estas la materialoj: „Dnepro laboras por la socialismo!“, „Laŭ la vojo de la kolektivismo“, „En Sverdlovsk estas 22 superaj lernejoj“, „La fabriko kuiras ĉe uzino „Krasnij Putilovec“, „La evoluo de la sporto en Sovetunio“.

Per la leteroj de siaj laboristaj-kampanaj korespondantoj el la soveta lando ambaŭ gazetoj refutas la disvastigatajn de la burĝaj rondoj elpensadojn pri Sovetunio. Al la konkreta kalumnio en la burĝa gazetaro la el-

donoj respondas per faktoplena korespondado de siaj sovetaj korespondantoj.

Interesaj por la legantoj estas la korespondadoj en „Mejdunaroden Rabsekor“, kiuj montras la ĉiufankan evoluon de la diversnaciaj popoloj, unuigintaj en USSR (numeroj 14, 15, 30, 32).

La esperantaj gazetoj per ĝeneraligaj ĉefartikoloj, verkitaj kompetente, en formo de eseoj, regule notas la datrevenojn de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. („Mejdunaroden Ezik“ — n-ro 3, „Mejdunaroden Rabsekor“ — n-ro 22 kaj aliaj). La eldonoj aperigas detalajn raportojn pri la unuamajaj solenajoj en la soveta lando. Ĉiuj publikadoj estas riĉe ilustritaj per fotomaterialoj („Mejdunaroden Rabsekor“ — n-ro 13 kaj 35). Okaze de la XVII-a kongreso de la Tutunia Komunista Partio (bolŝevikoj) detale rakontas numeroj 24 kaj 27 de „Mejdunaroden Rabsekor“.

Paralele kun la ofte komentata problemoj pri la preparo de la imperiistaj ŝtatoj por kontraŭsoveta milito („Mejdunaroden Ezik“ — la 1—15-an de junio 1932) oni publikigas ankaŭ vicon da materialoj pri la forto, potenco kaj nevenkebleco de la Ruĝa Armeo, raportojn pri la vivo de la ruĝarmeanoj. La efekto de la materialoj plifortigas multnombraj fotoj (n-ro 7—8, 9, 20, 32).

Prezentante la veron pri la vivo en la unua en la mondo socialisma lando, la E-gazetoj gajnas ne nur legantojn inter la vastaj popolamasoj, sed ankaŭ novajn adeptojn por la progresema esperantista movado.

Maria JANKOVA

FENOMENO EN LA JURNALISTIKO

(50 jarojn depost la apero de n-ro 1 de „Mejdunaroden Rabsekor“)

Iom post iom oni venas al la ideo pri transformo de gazeto „Mejdunaroden Ezik“ („Internacia Lingvo“, 1931-1932) en „Mejdunaroden Rabsekor“ („Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“, 1932-1934) ĉar multaj el la legantoj serĉas „Mejdunaroden Ezik“ pro la korespondadoj, venantaj el eksterlando, kies aŭtoroj estas memvidintoj de aktualaj internaciaj eventoj.

Sur la paĝoj de gazeto „Mejdunaroden Rabsekor“ ĉiu letero aŭ korespondado transformiĝas en dokumenton de la klasbatalo. Gis

nun ni ne havas informon pri la ekzistado de alia simila eldono. Tiasence „Mejdunaroden Rabsekor“ estas fenomeno ne nur en la bulgara ĵurnalistiko, sed ankaŭ en internacia skalo.

La redaktoroj de „Mejdunaroden Rabsekor“ kreas kompletan korespondantan reton. La regulan amasan alvenon de materialoj la gazeto garantias al si ankaŭ per la tiel nomata „PEK-servo“ (PEK — Proleta Esperantista Korespondado).

El la tuta mondo la poŝto alportas korespondadojn por „Mejdunaroden Rabsekor“. La

gazeto ne nur informas pri politikaj eventoj, sed komentas ilin, observas ilian evoluon. Ekzemple, la ofensivo de la faŝismo kaj la faŝismo de la eŭropaj registaroj, la preparado de la socia opinio profite al kontraŭsoveta kaj nova monda milito. Dum la Lejpciga proceso la gazeto aperigis materialojn defende al Georgi Dimitrov kaj liaj kamaradoj, akuzitaj pro bruligo de la Rajhstago.

La justa voĉo de la gazeto estas maloportuna por la registaro de Nikola Muŝanov kaj tio estas la preteksto por ofta konfiskado de „Mejdunaroden Rabselkor“.

La puĉo je la 19-a de majo 1934 kaŭzas la likvidon de ĉiuj laŭlegaj laboristaj organizaĵoj kaj de iliaj presorganoj. Gazeto „Mejdunaro-

МЕЖДУНАРОДЕН РАБСЕЛКОРЪ

13

Есен 2 1934

„Mejdunaroden Rabselkor“ estas populara ankaŭ pro la geografia vario de la publikigataj en ĝi korespondataĵoj. Alvenas materialoj el bulgaraj urboj kaj vilaĝoj, el Sovetunio, Pollando, Hungario, Japanio, Ĉinio, Germanio, Svedio, Britlando, Francio, Portugalio, Brazilo, Aŭstralio, Jugoslavio, Nov-Zelando, Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Rumanio k. a.

den Rabselkor“ estas malpermesita. Ĝia lasta numero aperas la 6-an de majo 1934.

„Mejdunaroden Rabselkor“ estas sur la fronta pozicio de la klasbatalo. Ĝi batalas por socia justeco kaj por mondpaco. Pri la gazeto plene validas la principoj de la komunista partio kaj amaseco. Tio estas eldona-batalanto, brila reprezentanto de la bulgara proleta gazetaro.

M. B

Vin gloras milionoj!...

Okaze de la 60-jariĝo de
l'Unio de Sovetaj Social-
listaj Respublikoj

Sesdek jaroj!

Historie

estas tempo ne tre longa...

Tamen pri popoloj luktanta

por transformi vivon sian

estas longa periodo...

tempo plena de klopodo,

tempo heroo de konkeritoj

de plej saĝaj homaj veroj!

Pri la venkaj sesdek jaroj

simplaj homoj ordinara

el Hindio, el Libio,

malproksima Bolivio,

el Grekio, el Ĉilio

unuvoĉe krion levas:

«Vin salutas milionoj,

vin, ho laboremaj homoj!

Vivu, vivu, vi miloj

de l'soveta lando filo!

Festu nun la venkan vivon!

Ja la mondo ne vidis tiajn
bonkreantojn vervajn, bravajn,
lertajn manojn, dolĉajn kantojn,
kosmoflugojn, venkstandardojn!

Festu nun la venkan vivon!

Miras ni pri l'konstruaĵoj
pri sovhojoj kaj baraĵoj,
pri la kamp' kun mil traktoroj,
kaj pri frata am' en korjoj!

Festu nun la venkan vivon!

Por defendi la homaron
de hororaj militjaroj
vi komencis pacbatalon
grandiozan kaj realan!

Festu nun la venkan vivon!

Pri l'fieraj sesdek jaroj
simplaj homoj ordinara
el la tuta mondo vin laŭdas,
kun espero vin aplaŭdas.

Ljuba BOJAČIEVA


DOMO-MUZEO DE ĤRISTO POPOV

Dank' al la kunlaboro kaj helpo de Atanas Korčev, prezidanto de la urba Kulturdomo, en Dolna Orjahovica estis aranĝita muzea ekspozicio en la domo de Ĥristo Popov — pioniro de la bulgara E-movado, popola instruisto kaj kulturkleriga aganto.


En la laborĉambro sur etaĝero estas ekspoziciitaj liaj libroj, gazetoj, revuoj. En montrofenestroj oni povas vidi liajn manuskriptojn, kolekton el ercoj, diplomojn, medalojn. La modesta ekspozicio atestas tiel pri la familia etoso de Ĥristo Popov, kiel ankaŭ pri lia varia kleriga kaj scia agado. Ja de siaj samtempuloj li estis nomata „intelektala gvidanto de la movado“.

En 1969 mi ricevis de la filino de Ĥr. Popov dokumentojn, manuskriptojn kaj librojn, kiuj helpis min verki la artikolon „Unu el la unuaj“, publikigitan en „Bulgara Esperantisto“ de 1970. Dum mia laboro, ligita kun la aranĝo de la ekspozicio, oni trovis valcan dokumenton pri Ĥr. Popov. Tio estas kajero, en kiu li mem notis ĉiujn siajn publikigitajn artikolojn kaj eldonitajn librojn. Sur la lastaj paĝoj Ĥr. Popov skribis siajn E-rememorojn: en 1893 en Dolna Orjahovica venis P. K. Sapunov el Svišov — aŭtoro de lernolibro kaj vortaro de Volapük, kiu unua interesigis lin pri la ideo de internacia artefarita lingvo. Ellerninte Volapükon, Ĥr. Popov komencis ricevi la revuon „Volapükablad“ el Nurnbergo. En 1894 en la rusa gazeto „Niva“ („Grenkampo“) li legis pri la nova internacia lingvo Esperanto. Tuj li skribis leteron al la aŭtoro, kiu respondis, ke estas dezirinda aperigo de lernolibro per bulgaroj. La aŭtoro de Esperanto invitis lin esti „apostolo de la ideo“ en Bulgario.

Ĥr. Popov skribis pri siaj propagandaj E-prelegoj — en 1896 en Gorna Orjahovica, en 1897 — en Veliko Tarnovo, en 1900 — en Sumen, en 1901 — en Ruse. Li mencias pri la nekonsistanta ĝis nun E-pioniro Maĝrakov el



Interno de la domo-muzeo:
la laborĉambro de Ĥr. Popov



Solena inaŭguro de la domo-muzeo de Ĥristo Popov en Dolna Orjahovica

Veliko Tarnovo. Ni trovas la nomon de Mihail Kovačev, pri kiu Panajot Ĥitrov skribis en sia libro, ke dank'al Esperanto li studis medicinon en Rusio.

La fonduso de Ĥr. Popov troviĝas diversloke. Krom en la muzeo en Dolna Orjahovica, kie mi transdonos la materialojn, kiujn mi sukcesis eltrovi, alia parto estas en la Bulgara Esperanta Muzeo en Sofio pere de Ivan Sarafov kaj en la arkivo de Ivan Krestanov — amiko de Ĥr. Popov. Estas necese en la sekvaj jaroj fari liston de la heredaĵo de Ĥr. Popov, kiu helpos nian pluan esplorklaboron.

Olga CANKOVA

PISANICA — LOKO POR LERNADO, FERIADO KAJ AMUZADO

(Interjuo kun **Maria Toleva**, direktorino de la Internacia E-kursejo (IEK) en Pisanica, Rodopimontaro).

„Pisanica estas surpriza kaj tre agrabla travivaĵo!“

„Pisanica estas ravanta eltrovo!“

„Ĉu estas pli granda feliĉo ol tiu lerni Esperanton en belega natura medio ĉirkaŭite de multaj zorgoj, atento kaj varmo?“

(El la impresoj de kursanoj en Pisanica)

— Kiel estas organizita la instruado de Esperanto en Pisanica?

— Ni akceptas gastojn dum la tuta jaro — individue kaj en grupoj por 14- aŭ 20-tagaĵ okupoj. Venas poloj, hungaroj, ĉeĥoslovakoj, jugoslavoj, belgoj, francoj, rumanoj, grekoj, sovetianoj k. a. Iuj eksterlandaj grupoj venas kun siaj kursgvidantoj. Al la ceteraj la estraro de IEK proponas spertajn kursgvidantojn por ĉiuj gradoj. En la Kursejo funkcias kursoj de tri gradoj. Unua grado — por komencantoj, dua grado — por progresintoj kaj tria grado — por perfekta lingvokono. Kaj dum la somero — en julio kaj aŭgusto — funkcias kursoj por instruistoj, kiuj deziras diplomigi pri instruarĵto.

— Ĉu oni povas bone ripozi en Pisanica?

— Nia unua, plej grava celo estas — instrui Esperanton. Sed ni ne forĝesas, ke oni lernas plej bone en agrabla etoso. En nia programo ni antaŭvidas tempon por ĉio — kompreneble, unualoke, por serioza laboro, sed ankaŭ por ripozo kaj amuzado, ĉar oni venas ĉi tie por samtempe lerni kaj ferii. Ciudimanche por la dezirantoj oni organizas ekskursojn per propraj aŭtobusoj de la kursejo al interesaj lokoj kaj historiaj monumentoj.

— Ĉu vi povas rakonti pri kelkaj ekskurslokoj?


— Jes, kompreneble. Ekzemple, Pamporovo, unu el la plej preferataj vintraj ripozlokoj en Bulgario. Ĝi estas alloga ne nur per la luksaj kaj gastamaj hoteloj, sed precipe per sia klimato, kiu ebligas skiadon dum

5—6 monatoj de la jaro. Tie la suno intense brilas kaj oni povas brunigi ne malpli bone ol ĉe la marbordo. Per lifto la turistoj atingas montopinton „Snejanka“, kie troviĝas televidturo kun kafejo-dolĉaĵejo. En bela vetero desur la televida turo oni povas vidi la Egean Maron.

Alia vizitinda loko estas Agusevi Konaci apud vilaĝo Mogilica (40 km for de Pisanica). Ĝi prezentas grandan loĝejkomplekson de la renesanca epoko, konstruitan en 1843 de bulgaraj majstroj-konstruistoj por la bezonoj de tri fratoj — grandaj turkaj feŭduloj. La ensemblo, kiu portas la tipajn trajtojn de la rodopa arkitekturo, estas relative bone konservita. Nun ĝi estas monumento de la kulturo kaj filio de la distrikta historia muzeo en urbo Smoljan.

— Kiajn vivkondiĉojn proponas Pisanica?

— La kursejo disponas pri luksaj ĉambroj kun 2, 3, 4, 6 kaj 8 litoj. Estas ankaŭ 4 apartamentoj. Estas entute 200 litoj.



Unu el la elegantaj salonoj de la domo-kursejo en Pisanica

Vasta manĝejo por 150 personoj kun moderna kuirejo kontentigas eĉ la plej preten-
deman guston.

Agrablaj ripozejoj sur ĉiu etaĝo, provizi-
taj per televidaparatoj, donas eblecon pasigi
agrabla la liberan tempon kaj fari interesajn
konatigojn, ludi ŝakon aŭ triktrakon. Por
la dancemuloj ĉiuvespere funkcias bona dis-
koteke. Nia celo estas proponi al niaj gastoj —
bulgaroj kaj alilandanoj, bonajn kondiĉojn
je moderaj prezoj.

— Ĉu la estraro de IEK antaŭvidas pluajn
plibonigojn de la vivkondiĉoj?

— Jes, per la helpo de la Centra kaj
Distrikta Estraroj de BEA estas konstruataj
sporta komplekso, tenisejo, retpilka kaj kor-
bopilka ludejoj, loko por pikniko.

La Internacia E-Kursejo en Pisanica —
tiu ĉi unika esperanta palaco en la Rodopi-
montaro, gastame malfermas siajn pordojn
por ĉiuj, kiuj deziras lerni Esperanton — la
belan lingvon de paco, amikeco kaj inter-
kompreniĝo.

Intervjuis: Mihail ELENOV

Alilandaj kursanoj pri Pisanica

Ing. Miroslav NAVRANEK — ĈEĤOSLOVAKIO

Mi estas ege kontenta, precipe pri la alta
nivelo de instruado, de surprizige serioza
intereso de la kursanoj pri lernado. Ĉie,
ĉu en la klasĉambroj, ĉu en la biblioteko
aŭ en la komfortaj ripozejoj sur ĉiu etaĝo
vespere, ĉu sur la herbejo posttagmeze oni
povas vidi kiel la kursanoj legas siajn no-
tojn, por bone prepari sin al la ekzameno
fine de la kurso. Kaj mi vidas, ke ĉiuj estas
same kontentaj kiel mi. La ĉirkaŭaĵo — la
belega Podopi-montaro estas ravanta.

La lektoroj estas vere sinceraj, entuzias-
maj, kleraj esperantistoj, spertaj pedagogoj.
Kompreneble, mi povas taksu nur la instrula-
boron de Kunĉo Valev, kiu estis lektoro en
mia kurso de kvara grado (metodika grupo).
Sed mi parolis kun multaj lernantoj — pro-
fesiaj instruistoj — el ĉiuj klasoj. Kaj ĉiuj
kursanoj taksis tre alte la meritplenan peda-
gogian agadon de la lektoroj Violin Oljanov
kaj Fani Mihajlova — en la klasoj de tria
grado, de Valeria Cvetkova el Leningrado —
en la kurso de dua grado kaj de Penka Bujuk-
lieva — en la kurso de unua grado.

Mi fieras pri mia diplomo por instruarjo
de Esperanto, ricevita en la plej altnivela
laŭ mi, kursejo por instruistoj de Esperanto.

PERE SAUMELL I VILA — HISPANIO

La restado en la Internacia Esperanto-
Kursejo en Pisanica donis al mi tre interesan
sperton. Mi admiras la seriozan instruadon
kaj la fervoran atenton de la bulgara lernan-
taro, certe pli fervora ol tiu de la ekster-
landanoj. Mi kredas, ke la Kursejo havos
grandajn estontajn sukcesojn.

Okazis ekskursoj al la plej gravaj urboj
kaj vilaĝoj de la fama Rodopi-montaro, kie
oni povas vidi neforgeseblajn belajojn.

Specialan mencion meritas la afabla kaj
alloga karaktero de la bulgaroj. Mi ne sufiĉe
povos danki al ili pro la zorgoj por agrabligi
mian restadon.

Mi ne havis konatulojn ĉi tie antaŭ mia
dua alveno en Bulgario. Nun mi reiros hejmen,
havante multajn geamikojn. Al ĉiuj mi diras:
„Koran dankon! Ĉis revido!“



La interno de la diskoteko kaj amuzejo en
IEK — Pisanica

Post la kongreso de BEA en Ruse 1976 mi vizitis ekfamigintan Pisanica. Nun mi estas duafoje ĉi tie kaj finis la kurson de kvara grado (metodika grupo).

Pisanica estas ĉarma vilaĝeto apud distrikta urbo Smoljan en Rodopi montaro. La milda klimato kaj abunda verdaĵo, la silento, freŝa aero kaj la montara akvo efikas tre favore sur la sanstato kaj estas bona kondiĉo por sukcesa lernado de Esperanto.

La nova Internacia Esperanto-Kursejo estas bone ekipita — kiel hotelo, kaj ebligas agrablan restadon.

Mi rekomendas al ĉiu mia samlandano, samideano kaj korespondanto viziton de Pisanica en Bulgario kaj starigon de rilatoj kun la bulgara E-movado.



Gekursanoj el la IV-grada kurso por E-instruistoj, gvidata de K. Valev

PROFUNDE LIGITA KUN LA POPOLO

(Canko Ignev 60-jariĝis)



La 12-an de septembro j. k. en vilaĝo Stojanovo, distrikto de Loveĉ, la naskiĝloko de nia samideano Canko Ignev, okazis solena celebrado de lia 60-jariĝo kaj de lia preskaŭ duonjarcenta publika kaj esperanta agado. Por gratuli la jubileulon, la solenaĵon ĉeestis membroj de la buroo de DK de BKP en Loveĉ ĉe-kape kun la unua sekretario de la Distrikta Komitato kaj membro de CK de BKP Petar Balevski, la prezidanto de la Distrikta Popola Konsilantaro Georgi Sarkov, konataj sociagantoj el Sofio, Loveĉ, Plevno, oficiroj kaj batalamaradoj de Canko Ignev. Ĉeestis ankaŭ la membro de CK de BKP kaj unua vic-prezidanto de la Tutpopola Komitato por Bulgara-Soveta Amikeco Nenĉo Stanev.

Per gratulletoj kaj telegramoj el la lando kaj el eksterlando amikoj kaj konatoj, oficejoj kaj institutoj esprimis sian estimon al la jubileulo. La ĉeestantoj parolis pri lia riĉa revolucia, publika kaj scienca agado. Lazar Donĉev, kandidat-membro de CK de BKP kaj sekretario de la DK de BKP, legis salutleteron. La Ŝtata Soveto de PR Bulgario distingis la jubileulon per la alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — II grado.

Jam de siaj infanjaroj Canko Ignev vivas kun la suferoj de la kapitalisma vilaĝo. Estante 10-jara li jam partoprenas la infanajn grupojn de la partio, kiel junulo partoprenas la marksismajn-leninismajn studrondojn, en 1936 eniras la batalvicojn de la Laborista Junulara Unuiĝo, kaj en 1944 estiĝas membro de BKP. Pro lia revolucia agado kiel soldato en la garnizono de urbo Skopje (Jugoslavio) en 1942 li estas kondamnita je morto, sed ĉar ne estas plenaĝa, la mortverdikto oni anstataŭigas per 15-jarojn da severa malliberigo.

Post la 9-a de Septembro 1944 Canko Ignev aktive partoprenas la stabiligon de la popola registaro kaj la konstruadon de la socialismo en nia lando. Li estis sekretario de la DK de la Laborista Junulara Unuiĝo en Loveĉ, partoprenas la formigon de la popola milico. En daŭro de 35 jaroj li okupas respondecajn postenojn en la vicjoj de la Bulgara Popola Armeo: vic-ĉefo de la Centra Domo de la Armeo, ĉefo de la Teatro de la Popola Armeo, ĉefo de fako „Kulturo“ ĉe la Ĉefa Politika Direkcio de la Armeo ka. Pri tiu ĉi lia agado rakontis

la reprezentanto de la Ĉefa Politika Direkcio de la Popola Armeo kaj liaj kolegoj. En la nomo de la Ministerio de Popola Defendo al la jubileulo estis prezentita orumita stiletto.

En siaj gratuloj la ĉefo de sekcio „Estetiko“ ĉe la Filozofia Instituto de BAN, la supera scienca kunlaboranto Stanka Simeonova kaj la vic-prezidanto de la Komitato pri la Bulgaroj en Alilando Trifon Trifonov subtekstis la kontribuon de Canko Ignev al la bulgara scienco kaj sociopolitika vivo.

La internacian lingvon Esperanto Canko Ignev komencas lerni tre frue. En 1934 li jam estas esperantisto. Li estigas membro de E-societo „Espero“ en Loveĉ kaj disvolvas vastan korespondagadon. Kune kun sia kamarado li tradukas kaj eldonas „Baj Ganju“ („Onklo Ganju“) de Aleko Konstantinov, tradukas „Gramada“ („Stonamasego“) de Ivan Vazov, multajn rakontojn kaj versojn de progresemaj verkistoj kaj poetoj; li redaktas la esperantan bibliotekon „Espero“, la esperantan kolonon en la loka gazeto. En 1940 en urbo Loveĉ okazas la 27-a E-kongreso. Canko Ignev estas sekretario de la Organiza Komitato kaj disvolvas vastan agadon por sukcesa okazigo de tiu ĉi forumo en la jaroj de la jam komenciĝinta ofensivo de la faŝismo. En sia eldiro antaŭ la kongreso li proponas

enkondukon de Esperanto en la lernejoj.

Kiel politika malliberulo en la Milita Malliberejo en Sliven, kie li restas preskaŭ du jarojn kaj duonon, Canko Ignev ne ĉesigas sian agadon kiel esperantisto: li organizas kursojn, tradukas materialojn helpe al la personoj, studentaj la lingvon, redaktas esperantajn bultenojn, helpas la kursgvidantojn.

Sian E-agadon Canko Ignev daŭrigas ankaŭ post la 9-a de Septembro 1944. Li estas membro de la Sofia E-societo „M. Gorkij“, kaj en 1980 estigas ĝia prezidanto. Nun li estas membro de la plenkunsido de la Centra Estraro de BEA kaj de la buroo de la Urba Estraro de la E-organizaĵo en Sofio. En la jubilea solenaĵo pri la riĉa E-agado de Canko Ignev rakontis Hristo Kanev — membro de la buroo de CE de BEA kaj prezidanto de la Urba Estraro en Sofio, kaj la prezidanto de la DE de BEA en Loveĉ — la ĵurnalisto Coĉo Kolarov.

„Nia Canko“ — tiel la ĉeestantoj esprimis sian rilaton al la konata sociaganto kaj koramik.

Al la kara jubileulo kaj samideano Canko Ignev la bulgaraj esperantistoj esprimas siajn plej sincerajn sentojn kaj deziras al li bonan sanon, por ke li ankoraŭ longajn jarojn estu utila al la socio, al la scienco kaj al nia nobla esperanta agado.

Zora OŠANSKA

NI RECENZAS

AŬTORITATA INFORMILO PRI ESPERANTO

Fine de 1981 la libroeldonejo „Nauka“ (Scienco) de la Akademio de Sciencoj de USSR en Moskvo eldonis en 5 mil ekzempleroj la 86-paĝan ruslingvan libron „Jazik Esperanto“ (La lingvo Esperanto). Ĝia aŭtoro estas prof. d-ro Magomet Izmailoviĉ Isaev, mondkonata soveta interlingvisto kaj esperantologo, estro de la Interlingvistika Grupo ĉe la Instituto pri Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj de USSR kaj prezidanto de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj.

La libro estas numero de la populara ruslingva serio de skizoj „Lingvoj de la popoloj de Azio kaj Afriko“, fondita en 1959 de prof. G. P. Serdjuĉenko. Ĝia inkludo en la serion, kiel estas klarigite en la noto de la Ĉefa Redakcio pri Orienta Literaturo de la Libroeldonejo, estas ŝuldata al la fakto, ke „Esperanto estas disvastigita en la Oriento ne malpli ol en la Okcidento“.

La aperigo de la verko fare de tia aŭtoritata Libroeldonejo, kia estas libroeldonejo „Nauka“, estas granda kontribuo por la popularigo de Esperanto. Krome la libro ne estas nur simpla priskribo de la lingvo, sed kompleta informilo pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj valorega ilo por ties propagando.

En 14-paĝa enkonduko la aŭtoro donas sufiĉe detalan informon pri la problemoj de la internacia komunikigo, pri la naskigo kaj la efektivigo de la ideo pri kreo de artefarita internacia lingvo, pri la E-movado kaj pri la esperantologio en Sovetunio. Tie ĉi estas prezentita la vidpunkto de la soveta interlingvistiko al la problemoj pri la artefarita helplingvo, nome:

1. La problemoj pri la artefarita lingvo devas esti traktata sendepende de la problemoj pri la universala lingvo;

2. La artefarita lingvo havas helpajn karakterojn, kio signifas, ke ĝi estas destinita nur por faciligi la multflankan komunikigon de la homoj sur la internacia areno, do ĝi kontraŭstaras nek al la naciaj, nek al la interpopolaj, nek al la mondaj lingvoj, samkiel al la specialigitaj kodoj kaj signalsistemoj;

3. La artefarita lingvo devas posedi la tutan komplekson de funkcioj, inkluzivante tiun de la lingvo de beleto.

Grandan parton de la libro okupas la priskribo de Esperanto (strukturo, fonetiko, leksiko, morfologio kaj sintakso), kiu estas farita tre kompetente kaj lerte. Ĝi donas klaran imagon pri la lingvo kaj ties karakterizaĵoj. Esperanto estas prezentita kiel lingvo, kiu neniu:

rilate estas malpli taŭga ol la naciaj lingvoj eĉ koncerne la frazeologion. „La riĉa frazeologio, skribas la aŭtoro, kune kun la dinamika leksika-semantika sistemo, inkluzivanta ankaŭ la terminaron, garantias la eblecon utiligi Esperanton en ĉiuj sferoj de la nuntempa homa lingva adago — en scienco kaj beleto, en konferencoj kaj sur la teatra scenejo, en la ĉiutaga vivo kaj en la poezio“.

(p. 30).

Tre valoraj estas la kvar tabeloj kaj la tri skemoj, kiuj tre bone ilustras iujn gramatikajn regulojn de la lingvo kaj faciligas ties komprenon.

La skizo de la gramatiko de Esperanto kune kun la konciza Esperanto-rusa vortaro, celanta montri la leksikan bazon de Esperanto, kiu entenas la fundamentajn E-radikojn, ludas samtempe la rolon de ŝlosilo de Esperanto.

Valoregaj estas la suplementoj: Listo de la internaciaj kaj landaj esperantistaj organizaĵoj, Listo de la universalaj Esperanto-

kongresoj, la tekstoj de kelkaj gravaj dokumentoj — la Ĝenerala Interkonsento inter Monda Packonsilio kaj Internacia Komitato de MEM, la Alvoko de UEA al UN, ekstrakto el la Rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1954, Listo de la eldonaĵoj en Esperanto, publikigitaj en USSR dum 1963—1978, opinioj pri Esperanto de famaj personoj, modeloj de tekstoj, la jam menciita konciza Esperanto-rusa vortaro, Listo de la uzita literaturo, Listo de la vortaroj kaj Listo de la lernolibroj de Esperanto por ruslingvanoj. Tiuj ĉi suplementoj entenas tre utilajn informojn por la leganto kaj kompletigas la imagon pri Esperanto.

La esperantistaro devas danki al la aŭtoro pro tiu ĉi libro, kiu meritas esti tradukita en la naciajn lingvojn. Estas bedaŭrinde, ke la verko aperis en relative malgranda eldonkvanto.

Dimitar HAĜIEV

ORIGINALA E-VERKARO

VESPERA AŬTUNA PROMENADO

Fruaŭtuna vespero, malrapide falas ĉarma bluite-rozkolora krepusko. Mi estas sur la malgranda placo „Oborište“ en Sumen. Facile lulataj de la milda vento, sorĉe flustras la folietoj de la granda plorsaliko, kies maldikaj branĉetoj pendas ĝis la pavimo mem. Aŭdigas la mallaŭta monotona murmurado de rivereto Porojna.

Mi ne povis venki la tenton fari mallongan vesperan promenadon al la Balkanmontaro, spiri ĝian puran aeron, ĝui la belegajn vidaĵojn, kiujn proponas la verdaj arbaroj.

Post kelkminuta veturado per aŭtobuso ni jam estas antaŭ la Arbara Restoracio. Pitoreske situanta proksime de malgranda bela roko, la restoracia konstruaĵo plene harmonias kun la ĉirkaŭa medio, ĝi dronas en abunda verdaĵo. La folioj de la kreskantaj antaŭ ĝi branĉoriĉaj betuloj kaj altaj poploj tremetas kaj ilia mallaŭta flustrado karesas la orelon. Ĉarma loko!

Tie ĉi la brusto jam spiras profunde, kun plezuro kaj ĝuo, la freŝecon de la arbara aero.

Okcidente de la restoracio la arbaron eniras malnova vojo, preterpasas turistan domon, iras preter arbara rivereto kun klara kaj pura akvo. La riverlito abundas je grandaj kaj malgrandaj ŝtonoj, surkreskintaj de velure mola musko, kiu donas al ili neordinaran

belecon — precipe kiam ilin tuŝetas malofte penetranta tien ĉi sunradio. La akvo serpentumas inter la ŝtonoj, surverŝas ilin, farante tie kaj tie mirindajn laĝetojn. La riverbordojn kovras abunda verdaĵo — arboj, pendantaj kaj rampantaj plantoj. Grandaj kaj malgrandaj branĉoj etendiĝas de ambaŭ bordoj super la rivereto, speguliĝas en la akvo kaj iliaj folioj — diverskoloraj kaj variaj laŭ grandeco kaj formo, konstante tremetas pro la facila arbara venteto. Sorĉa vidaĵo! Mi rigardas, rigardas kaj ne povas kredi, ke tiu ĉi beleco estas tiel proksime de la urbo! Irante plu laŭ la sama vojo, oni povas veni al la malnova fontano kun klara malvarma akvo, al la kaverna „Zandana“, nun alinomita kaverna „Perlo“. Ankoraŭ pli alte situas la groto „Krumovi Porti“.

Sude de la Arbara Restoracio altenleviĝas deklivo, preter kiu serpentumas asfaltita vojo, kondukanta en la arbaron. Altaj, dikaj arboj etendas siajn branĉojn super ĝi kaj aldonas al ĝi misteran, sorĉan aspekton. La vojo kondukas pli kaj pli supren. Sude, malantaŭ Ilčov Bair vastiĝas belegaj virgaj arbaroj, kaŝantaj multajn sekretojn kaj legendojn pri la bataloj de nia popolo por libero. Tio ĉi estas la legendaj arbaroj, pri kiuj rakontas

Vasil Drumev¹ en sia novelo „Malfeliĉa familio“. Tie estas la tombo de la kursistoj, kruele mortigitaj de la bulgaraj faŝistoj en 1933.

Ce la lasta haltejo mi eliras el la aŭtobuso. Al tri direktoj kondukas asfaltitaj vojoj, kiuj penetras profunde en la arbaron. Estas speciala vojo, kiu direktiĝas al la „Malnova Urbo“, sed mi ne havas eblecon iri kaj vidi ĝin, nek la sanigajn infangardenojn kaj mondomojn de diversaj industriaj entreprenoj.

Mi revenas kun la sama aŭtobuso, laŭ la sama vojo. Denove la sama agrabla vidaĵo,

¹) Vasil Drumev — bulgara verkisto (1841—1901).

sed pro la vespera krepusko — pli alloga, mistera, neforgesebla, tuŝanta la homan animon. . .

Belega estas nia Balkano! Belegaj arbaroj, kristale klaraj riveretoj kaj lagoj, ebrigiĝaj birdkantoj, ĉarma flustro de la arbarfolioj. . .

Guante tiun ĉi belecon, vin obsedas deziro ĉirkaŭpreni ĉion ĉarman, belegan, grandiozan kaj ĝin forporti por ĉiam kune kun si!

Iru, amikoj, al nia belega Balkano, iru al la arbaroj por spiri freŝan, puran, sanigan aeron, por senti kiel la milda arbara alblovo karesas vian vizaĝon, tuŝetas profunde vian bruston!

Vasil OSTREV

MIAJ LASTAJ RENKONTIĜOJ KUN PODKAMINER



Eble por multaj esperantistoj la informo pri la forpaso de la konata soveta veterano kaj elstara pacbatalanto S. N. Podkaminer venis iel subite, neatendite. Kvankam superinta la aĝon de okdekjarulo (naskita en 1901), li daŭre aktivadis kaj oni malfacile povus supozi, ke tiu saĝa, multon spertinta persono baldaŭ forlasos niajn batalvicojn. Ve, tio jam estas kruda fakto. . .

Dum la antaŭlastaj tagoj de junio ĉi-jare mi pasigis en Leningrado du tagojn. Anticipe mi telefonis al pacamiko Podkaminer pri mia alveno kaj li insistis pri nepre renkontiĝo. Je la flughaveno atendis min k-do Volkov, sekretario de Sovetia MEM-sekcio, kies prezidanto estis Podkaminer. Volkov tuj invitis min viziti la Leningradan Domon de Amikeco kaj Paco, kie mia amiko atendis min. Amika ĉirkaŭpreno kaj triobla kiso, laŭ malnova rusa popolkutimo. Ni ĝojis

pri la ebleco renkontiĝi kaj preparoli iujn MEM-problemojn. Li informis min, ke nin invitas al amika akcepto la prezidantino de Leningrada SSOD¹-filio k-dino Ljutova. Tre aŭtable kaj amike ŝi renkontis nin. En bona etoso mi informis ŝin pri la celoj kaj aktivecoj de MEM kaj pri la antaŭstaranta MEM-konferenco en Antverpeno. Dum la konversacio ŝi kelkfoje substrekis, ke en la persono de k-do Podkaminer ŝi ĉiam trovas tre kapablan kunlaboranton, subtenatan de la esperantista medio en Leningrado. En tiuj medioj oni tre bone konis k-don Podkaminer kaj alte taksis liajn kapablojn. Ja ne hazarde li estis membro dum la tuta ekzistado de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj ĉe SSOD, preparinta la grundon por kreo de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj antaŭ kelkaj jaroj. Krome, Podkaminer estis konstanta membro de Leningrada Packomitato dum jardekoj, en personaj rilatoj kun la prezidanto de Monda Packonsilio s-ro Romesh Chandra.

Post la rendevuo kun k-dino Ljutova ni direktiĝis al la salono en la sama konstruaĵo, kie kutime kunvenas la leningrada esperantistaro. Laŭ propono de Podkaminer mi devis fari informprelegon pri la taskoj de la antaŭstaranta fine de julio Naŭa Generala MEM-konferenco.

Podkaminer prezentis min al la ĉeestanta esperantistaro kaj malfermis la kunvenon. En duonhora prelegeto mi informis pri la tagordo de nia MEM-konferenco kaj esprimis firman kredon, ke sovetaj esperantistoj ne nur partoprenos ties laboron, sed ankaŭ kontribuos, kiel ĝis nun, por la realigo de la konferencdecidoj. La kunveno pasis aktive, en atmosfero de amikeco kaj unuanimeco.

¹) SSOD — ruslingva mallongigo de la nomo de Asocio de Sovetaj Amikeco-Societoj.

Je la sekva tago mi renkontiĝis kun Podkaminer en la Somera parko de Leningrado. Li informis min, ke lia sanstato estas tre malbona, pro kio la kuracistoj ne donas al li permeson veturi al Antverpeno. Li longe kuŝis kaj nur por la renkontiĝo kun mi forlasis la liton. Lia eksterajo estis elokventa pruvo pri liaj paroloj: li estis malgrasa, pala, tre elkonsumita. Mia koro kuntiriĝis dolore. Mi ekhavis la antaŭsenton, ke tiu nia renkontiĝo certe estos la lasta... Nome tiel okazis.

Forpasis bonega esperantisto, kultura scienculo, kuraĝa patrioto kaj internaciisto, kon-

sekvenca pacbatalanto, energia, saĝa kaj teorie perfekte trejnita persono, posedinta grandan socian kaj politikan vivsperton. Ni nepre sentos lian foreston el niaj batalvicoj en la nuna treege streĉa internacia atmosfero.

Ni daŭrigos rezultoplene lian agadon kaj esprimos nian grandan estimon al li nur sek-vante fidele lian ekzemplon kaj lernante el lia teoria kaj praktika heredaĵo.

Ni profunde klinigu antaŭ la freŝa tombo de nia karmemora amiko S. N. Podkaminer!

Sofio, en septembro 1982

Nikola ALEKSIEV

MEMORE AL STEFAN MINKOV

La 2-an de julio 1982 en sia 100-jara aĝo forpasis la doĵeno de la Esperanto-movado enlanda kaj eksterlanda, la pioniro Stefan Minkov.



Li naskiĝis la 23-an de majo 1883 en u. Razgrad en la familio de metiisto. Malgraŭ la pezaj vivkondiĉoj li akiris maŝinteknikan edukon. Sep jarojn li oficis en sia fako en Francio. Post la reveno en Bulgario en 1911 ĝis la emeritiĝo en 1933 li estis instruisto en Mezgrada Maŝinteknika Lernejo en Sofio. Altklara fakulo, li verkis — ĉu memstare, ĉu kunaŭtore — 11 lernolibrojn por la mezgradaj kaj superaj teknikaj lernejoj. Li kunlaboris per artikoloj en vico de fakaj periodaĵoj. Vaste rekonata estas ankaŭ lia scipolitika agado.

Kun Esperanto Stefan Minkov konatiĝas en 1901 kiel lernanto en la Mara Maŝinlernejo en Varna. Li estas kunfondinto de la unua esperantista societo en tiu urbo en 1902. Li multe korespondas kaj starigas internaciajn ligojn. Utiligante la oficaĵajn ŝipkrozaĵojn sur la Nigra Maro li efektivas personajn vizitojn al aro da rusaj esperantistoj. La rusaj samideanoj ebligas al li renkontiĝon kun la granda rusa verkisto kaj eminenta subtenanto de Esperanto Lev N. Tolstoj en lia somerrestadejo apud Jalta en 1906. Dum la interparolo li interŝanĝis kun la eminentulo kelkajn frazojn en Esperanto.

Dum sia sepjara (kun ioma interrompo) restado en Francio Stefan Minkov vigle partoprenis la Esperanto-movadon en la lando — Chalons sur Saône, Mersurey, Beaune, Calais (kie li gvidis E-kursojn), Boulogne sur

Mer. En tiu lasta urbo en 1907 li konatiĝis kaj konversaciis intime kun d-ro L. L. Zamenhof, kiam revene de la III-a Universala kongreso en Kembrigo restis kun sia edzino en ĝi gaste.

Reveninte Sofion en 1911, la saman jaron, en septembro, li estas elektita en la estraro de Bulgara Esperantista Asocio (tiam Bulgara Esperantista Societo) kaj dum kelkaj jaroj li estas ĝia sekretario. Sekretario de BEA kaj kunredaktoro de ĝia organo „Bulgara Esperantisto“ Stefan Minkov estas ankaŭ en 1920—1921. La 39-a kongreso de BEA en 1976 en Ruse proklamis Stefan Minkov kiel honora membro de la Asocio.

La bulgaraj esperantistoj klinas la standardojn honore al la meritoplena veterano. Lian faron la bulgara esperantistaro ĉiam memoras.

Kr. KARUCIN

«AMATA RESTOS VI EN NIA KOR'...»

Al Stefan MINKOV

Rapide pasas niaj vivojaroj
kaj venas maljunec' — komuna sort',
sed restas la postsekvaj de la jaroj,
tre daŭraj kaj kun plej efika fort'.

Vi, karmemora Minkov, post vi lasis
neforgeseblajn brilajn spurojn, ĉar
de via vivo eĉ moment' ne pasis
sen faroj por la bono de l'homar'.

Vi ekde la juneco eklaboris
por paco kaj frateco en la mond';
por Esperanto vojon vi traboris,
semante amon en amika rond'.

Vi iam Zamenhof persone konis,
por vi ĝi estis ĝojo kaj honor',
kaj kiel instruist' vi sciojn donis
kaj tion faris el la tuta kor'.

Ho ve! Centjaran vian jubileon
vi ne ĝisvivis — trafis vin la mort',
sed vi atingis la viv-apogeon
kaj glora estis via tera sort'!

La tuta esperantist' bulgara
respekte gardos vin en la memor',
ĉar estis vi por ĉiuj homoj kara —
amata restos vi en nia kor'.

Simeon M. SIMEONOV

PATRINA LARMO

Angel KARALIJEV



Pasis 80 jaroj depost la naskiĝo de Angel Karaliev — unu el la grandaj bulgaraj verkistoj, kies verkoj dum la lastaj 25 jaroj aperis en eldonkvanto de 2 500 000 ekzempleroj.

Angel Karaliev verkis ankaŭ por plenaĝuloj, sed tamen li estas inter la plej bonaj porinfanaj verkistoj en la nuntempa eŭropa literaturo.

Estas verkistoj, kiuj interparolas kun sia popolo. Angel Karaliev interparolas kun la junaj generacioj. Li instruas la geknabojn ami la belecon kaj la onon, la patrolandon kaj la gepatran lingvon.

Eksusuris etguta aŭtuna pluvo. La flava voliaro en la ĝardeno ekbrilis. La grandaj vinberoj sub la vitlaŭbo pufiĝis kaj ilia ŝelo ekkreis. La violkolora astero klinis siajn florojn super la kuŝanta en la foliaro krevinta argilpoto. Kuŝiĝis la birdeto-hirundeto en la fundo de la argilpoto kaj ekstremis pro malvarmo kaj malĝojo. Ĉiuj forflugis. Forflugis suden ĝiaj du fratinetoj. Perdiĝis ĝia panjeto en la varmaj landoj. Kiu varmigis ĝin dum tiu pluvoriĉa nokto? Ili lasis ĝin sola sur la fundo de la argilpoto, ĉar ĝi estis kripla kaj ne povis flugi. Dum la somero eksplodis incendio en la domo, sub kies tegmento ĝia patrino estis farinta neston. Dum la maljuna hirundo sukcesis elpreni sian idon el la fajro, karbo falis en la neston kaj brulvundis la hirundidon je la dekstra flugilo. La nuda birdeto svenis pro doloro. Rekonsciiĝinte, ĝi vidis, ke troviĝas en nova nesto kaj apud ĝi staras ĝia patrino kun kliniĝinta kapo. Unue ĝi provis movi la flugiletojn, sed ne povis, ĉar la dekstra, la brulvundita flugilo estis difektita.

Pasis la somero. Malheliĝis la vinberoj. Krevis la burĝonoj de la asteroj en la ĝardeno. La hirundoj komencis kolektiĝi sur la telegrafaj dratoj. Ili pretiĝis forflugi. La dratoj eksimilis al rozarioj. Iun matenon la maljuna

hirundo surterigis en la ĝardenon sian kriplan idon kaj diris:

— Kara infano, hodiaŭ ni forflugos suden. Vi ne povas flugi. Tial vi restos ĉi tie, jen en tiu ĉi argilpoto mi preparis al vi molan plumaron. Tie vi kuŝos kaj kiam vi estos malsata, eliru eksteren kaj beku ion. La tuta ĝardeno estas superŝutita de fruktoj. Vidu kia bela astero klinis frunton super la enirejo de la argilpoto. Vi ne malĝoju. Printempe ni revenos.

— Dankon, patrineto mia, pro viaj zorgoj por mi! — flustris la kripla birdeto kaj por kaŝi siajn larmojn enigis kapeton sub la flugilon de sia patrino kaj silentiĝis. . .

Ĉiuj forflugis. Viciĝis malserenaj tagoj. Ekpluvis etguta pluvo. La malseka astero peze klinis sian floron super la argilpoto. Pluvigito ruliĝis laŭ la plej malsupra folieto de la floro kaj pretiĝis fali.

— Ah, kiel laca mi estas! — ĝi sopirĝemis.

— De kie vi venas? — scivoleme demandis la hirundido.

— Ho, longan vojon mi trairis. Mi venas de la Pacifiko. Tie mi naskiĝis. Mi ne estas pluvigito. Mi estas larmo.

— Ĉu larmo? Kia larmo? — maltrankvile demandis la hirundido.

— Patrino larmo mi estas. La historio de mia vivo estas mallonga. Antaŭ naŭ tagoj iu laca hirundo kun larmoplenaj okuloj sidiĝis sur la masto de granda oceana vaporsipo. Mi estis en la dekstra okulo de la ĉagrenita birdo. La oceano muĝis. Blovis forta vento. Per malforta voĉo la hirundo diris al la vento:

„Frato mia vento, kiam vi flugas super la mondo, se vi trapasos Bulgarion, vizitu, mi petas, mian kompatindan hirundidon kaj diru al ĝi gardi sin de la nigra kato, kiu vagas en la ĝardeno. Mi forgesis averti mian idon antaŭ ol forflugi. Diru al ĝi ankoraŭ, ke mia koro doloras pro angoro. . .“

— Kie estas via hirundido? — demandis la vento.

— Mi lasis ĝin en unu krevigita argilpoto en la ĝardeno, kie floras violkoloraj asteroj. Dum la maljuna hirundo elparolis ĉi tiujn vortojn, mi falis el ĝia okulo. La vento kaptis kaj kunportis min tra la mondo. Naŭ tagojn mi flugis kaj jen mi falis sur ĉi tiun floron. Kiel laca mi estas! Mi volas guti kaj endormiĝi. . .

La koro de la kripla hirundido forte ekbatis. Ĝi leviĝis rapide, malfermis bekon kaj englutis la trolacigitan patrinan larmon.

— Mi dankas al vi, panjo mia! — flustretis ĝi, kuŝiĝis en la plumaro kaj endormiĝis, varmigit de la larmo, kvazaŭ ĝi estus sub la patrinaj flugiloj.

Tradukis: Koljo PANĈEV

MALFERMO DE LA KULTURA SEZONO

E-societo „Ivan Krestanov“ en la sofia regiono „Lenin“ organizis kunvenon por malfermo de la kultura sezono.

La prezidanto de la societo Mihail Cobanov parolis pri la graveco de la tasko dum la lernoaro la societo disponu pri sufiĉe da instruistoj kaj uzu ilin por organizado de kursoj.

Estis plenumita artprogramo, kiun partoprenis la artistoj Mihail Zdravov, Dimitar Denčev, muzik-kvarteto kaj solistoj.

Simeon Hsapčiev rakontis siajn travivaĵojn en la jaroj antaŭ la Naŭa de Septembro 1944 kaj Asen Grigorov — siajn rememorojn kiel persona sekretario de la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov.

C. M.

SIPESTRO INSTRUAS ESPERANTON

Nia konata esperantisto-maristo Georgi Dobrikov — loĝanto de Pisanica, dum siaj ferioj somere sukcese gvidis E-kursojn en la Internacia Esperanto-Kursejo, kiujn partoprenis poloj, germanoj, bulgaroj.

Bone sciante polan kaj germanan lingvojn, per rakontoj pri la marista vivo, ŝercoj kaj anekdotoj Georgi Dobrikov vekis grandan intereson al la Internacia Lingvo Esperanto. Vespere la kursgvidanto projekciis lumbildojn pri siaj marveturadoj. Tiamaniere la gekursanoj „vizitis per ŝipo“ multajn proksimajn kaj forajn landojn — Indonezio, Ĉinio, Aŭstralio, Nov-Zelando, Havajaj insuloj, Meksiko k. a.

Dum la ekzamencoj la gekursanoj de Georgi Dobrikov montris tre bonajn rezultojn.

Ivan PETROV

GASTIS PROF. NEERGAARD

S-ro prof. Paul Neergaard el Kopenhago (Danio), specialisto pri agrokulturaj problemoj de la semoj, estis invitita en Bulgario por transdoni sian sperton kaj metodojn de batalo kontraŭ infektoj de la semoj. En nia loka instituto pri agrikulturo „Obrascov ciflik“ — apud Ruse — li laboris unu semajnon. Kiel vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, li akceptis la inviton kaj bonvolis gastis en la klubo de E-societo „Libero“. Lia vizito estis eksterordinara evento en la societa vivo, malofta okazo aŭdi elstaran akademianon pri la lingvaj problemoj.

Boris KAVALĜIEV

INTERESA EKSPOZICIO

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov esperantistoj el Veliko Tarnovo organizis ekspozicion de materialoj, ricevita de eksterlandaj gekorespondantoj.

La materialoj — fotoj, bildkartoj, ĵurnaloj, gazetoj k. a., estis ekspoziciitaj en montrolfenestroj, en homplena strato proksime de Interhotelo „Veliko Tarnovo“.

Ĉiu sendinto de ekspoziciaĵoj ricevis donace la E-librojn „Georgi Dimitrov“ de P. Radenkova kaj „Georgi Dimitrov pri Esperanto-movado kaj pacbatalo“ de Nikola Aleksiev.

De la 1-a ĝis la 10-a de julio j. k. en la montara E-ripozkomplekso Borima, distrikto de Lovec, okazis la Dua Somera Internacia Esperantista Seminario-feriado, dediĉita al la 100-jara datreveno de Georgi Dimitrov. Tiu ĉi seminario jam konfirmis kiel internacia arango kun siaj tradicioj, kie ĉiu komencanto povas lerni Esperanton, kaj ĉiu progresinto povas perfektigi.

La gesamideancoj el E-klubo „Ora Pordego“ en urbo Kiev — Sovet-Unio, speciale skribis salutis la partoprenantojn en la seminario, dezirante al ili frukto-donan laboron kaj multajn sukcesojn en ilia E-agado.

Ĉi-sube ni proponas al la atento de la legantoj kelkajn opiniojn de partoprenintoj en la seminario.

JOLT BALG, Hungario: „Tiu ĉi seminario estas granda internacia propagando por Esperanto. Laŭ mia opinio tiu ĉi utila arango bezonas pli aktivan propagadon. Dum 1981 mi partoprenis internacian laborbrigadon en Debnevo (IELBA) kaj en 1982 mi estis premiito de la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Lovec per senpaga partopreno en tiu ĉi seminario. La lernado de Esperanto ripozante estas tre oportuna, utila, pli rapida, intensa kaj pli efika metodo. Mankas la laceco de ĉiutaga laboro. Krom tio, ĝi estas kombinita kun amuzoj, ekskursoj sur la fono de amika atmosfero. Mi tre bone fartis en Borima kaj perfektigis miajn E-konojn sub la sperta gvidado de Ivan Lišev. Mi dankas al la organizantoj pro ilia afableco kaj kora gastamo.“

MAKS RIEDER, Aŭstrio: „Mi alvenis en la patrolandon de Georgi Dimitrov, kiu estis por mi imitinda ekzemplo dum mia antifaŝista batalo kaj en la malliberejo. Hejme, en Aŭstrio, mi tralegis en la



Donacoj kaj premioj por la plej bonaj kursanoj.

Foto: Kiril Kalčev

E-gazeto „Heroldo de Esperanto“ pri la somera seminario en Borima. Ĝi estas tre bela kaj trankvila loko, tre konvena por la celo. Mi konatigis ĉi tie kun multaj novaj geamikoj, kun kiuj mi lernis kaj parolis Esperanton. Ĉiuj — organizantoj, kursgvidantoj kaj partoprenantoj estis tre bonaj kamaradoj. La internacia atmosfero de la seminario treege plaĉis al mi.

PETJA TODOROVA, lernantino el urbo Gorna Orjaŭovica, Bulgario: „Mi estas la plej juna esperantistino en la seminario. Mia patrino estas esperantistino kaj mi venis tien ĉi kun ŝi. La atmosfero

de la seminario estis vere internacia kaj amika, kiel en Esperantujo. Mi estas fiera, ke mi povas konatigi kaj paroli kun pli maljunaj esperantistoj el nia lando kaj el aliaj landoj. Mi jam havas multajn E-amikojn. Mi volas korespondi kun esperantistoj el la tuta mondo, ĉar mi komprenis, ke Esperanto estas taŭga internacia komunikilo kaj rimedo por la tutmonda amikeco."

LILJANA PEEVA el urbo Pleven, Bulgario: "Mi estas instruisto de rusa lingvo kaj mi deziras instrui ankaŭ Esperanton. En Borima mi venis kun mia kvarmonata bebo, ĉar mi ne havis alian eblecon perfektigi miajn E-sciojn en alia kursejo kun ĝi. Ĉiuj gesamideanoj — organizantoj kaj partoprenantoj — helpis al mi."

Post la ekzamenoj la kursgvidantoj analizis la rezultojn kaj dankis ĉiujn partoprenantojn pro ilia fervoro kaj serioza rilato al la seminario.

Post la seminario multaj el la partoprenantoj restis ĝis la 12-a de julio, kiam ili havis renkontigon en la E-klubo ĉe la Sindikata Domo en Loveĉ kun esperantistaj aktivuloj el la distrikta urbo.

D-rino TJURAN OMER

SOVETA ESPERANTISTINO GASTIS EN PLOVDIV

En la komenco de septembro en Plovdiv gastis la konata soveta esperantistino Valeria Cvetkova el Leningrado.

Multaj geesperantistoj venis en la urban E-klubon por renkontiĝi kun la gastino. Ŝi rakontis interese pri la diversflanka agado de leningradaj esperantistoj, pri ilia aktiva partopreno en la Internacia pacmarŝo.

Valeria Cvetkova montris lumbildojn pri la partopreno de diverslandaj esperantistoj en la pacmarŝo kaj pri Leningrado.

Fine en la nomo de la plovdivaj geesperantistoj al la gastino oni donacis florojn kaj memoraĵojn.

La vespero pasis agrable kaj kortuŝe.

Vladimir JELEV

KIAL DO NE FESTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“?

Multaj redakcioj de periodaj eldonaĵoj aranĝas ĉiujare festojn de iliaj presaĵoj. Tiujn festojn iufoje partoprenas dekmiloj da homoj.

Kial do ankaŭ nia revuo „Bulgara Esperantisto“ ne havu sian feston? Ĝi devas esti organizata dum la aŭtuno — en la plej intensa periodo de la abonkampanjo por la sekvonta jaro. La festo devas okazi ĉiujare en malsamaj urboj, kio kontribuos al la popularigo de la revuo kaj de Esperanto inter la loĝantaro en diversaj regionoj de la lando. La programo de la arango devas enhavi ekspoziciojn, kunvenojn kaj renkontiĝojn kun legantoj kaj lokaj esperantistoj, varbadon de novaj abonantoj, distingon de aktivaj kunlaborantoj k. a.

Mi estas konvinkita, ke la bulgaraj esperantistoj kun entuziasmo partoprenos la organizadon kaj la efektivadon de simila festo.

Nikola NIKOLOV

BRILA SUKCESO

Niaj gekantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov jam kelkfoje estis ŝatataj gastoj de la itala esperantistaro. Ĉi-jare ili denove prezentis sian kantarton en la lando de muziko.

La Bologna E-Grupo „A. Telini“ festis la 70-jaran jubileon de sia fondiĝo. Supra punkto en la tritaga kultura programo estis la koncerto de Angelova kaj Damjanov en la granda halo de la konservatorio „D. Rosini“. La entuziasmigita publiko arde aplaudis la bulgarajn kantartistojn, kiuj plenumis precipe kantojn de bulgaraj kaj rusaj komponistoj: D. Hristov, Pipkov, Haĝiev, G. Spasov, Ĉajkovskij, Rahmaninov, Aljabiev, Tulikov k. a. Kelkaj arioj kaj duetoj de Mozart, Verdi, Gounod, J. Strauss, Kalman, Offenbach k. a. estis tre sukcesaj por niaj gekantistoj.



[M. Angelova kaj V. Damjanov dum koncerto]

La gekantistoj havis koncertojn ankaŭ en Triest, Torino, Genova, Kiavari, Verona kaj Vicenza. Ĉi-foje M. Angelova kaj V. Damjanov estis varme akceptitaj ne nur de la italaj esperantistoj, sed ankaŭ de neesperantista publiko. Prof. d-ro Mario Dazini, prezidanto de Itala E-Federacio (IEF), oficiale salutis ilin en Bologna kaj Verona kaj invitis ilin denove gastigi en Italio.

M. GEORGIEVA

ESPERANTO EN FAKA KONGRESO

Inter la 4-a kaj 9-a de julio ĉi-jare en Kečkemet — Hungario, okazis kongreso de societo Bolyai János. Tio estas organizacio de la hungaraj ĝeinstruistoj-matematikistoj.

Kiel reprezentanto de la Asocio de Matematikistoj en Bulgario la kongreson ĉeestis Petko Arnaudov el Pazargik. Liaj salutoj al la kongreso je la nomo de bulgaraj matematikistoj, lia partopreno en la diskutoj kaj lia fakprelego estis en Esperanto. En Esperanto estis ankaŭ la dufoje ripetita informo pri Pazargik-distrikto (Bulgario), akompanita per lumbildoj.

Perfekte interpretis la hungara matematikistino-esperantistino, doktoro pri matematika lingvistiko Berenyi Szuzsanna.

PEARO

OKDEK JAROJN ESPERANTISTA KLUBO EN PRAGO

Antaŭ 80 jaroj, la 9-an de decembro 1902, estis fondita la Esperantista Klubo en Prago. Ĝi estis fondita de grupo da entuziasmoj kun la celo disvastigi la Internacian Lingvon inter la ĉeĥoj kaj la ĉeĥan kulturon eksterlande. Tiu ĉi celo estis aparte grava, ĉar en la tempo de la Aŭstro-Hungara regno la ĉeĥa popolo estis eksterlande tre malmulte konata.

Tuj ĉe la komenco de sia ekzisto la klubo spertis gravan rekonon kaj reputacion en la ĉeĥa socio. La klubo ricevis diplomon de la ĉeĥa sekcio de la aŭstria ekspozicio en Londono en 1906 — „por faritaj valoraj servoj“. En la jaro 1907 la tiama Ĉeĥa Nacia Konsilantaro decidis, ke la Esperantista Klubo en Prago havu unu membron en la eksterlanda sekcio de CNK cele de ĝusta informado de la eksterlandanoj pri la ĉeĥa nacio. Dank'al la aktivecoj de la klubo oni decidis organizi la 13-an UK en 1921 en Prago. Ĝi estis amase vizitata kongreso kun 2 500 kongresanoj.

La jubileo de la klubo estos grava impulso por nova kaj pli granda aktiveco de ĝiaj membroj.

La klubo akceptas bondeziraĵojn al adreso: Esperanto-klubo Praha, p. schr. 1069, CS-III 21 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

JIRI PATERA,
komitatano de EKP

Noto de la redakcio:

En la nomo de la bulgaraj geesperantistoj ni kore salutas niajn E-amikojn el la EKP kaj bondeziras pluajn sukcesojn en ilia nobla agado.

NOVAĴOJ EL SOVETUNIO

SAMARKANDO:

Sub la titolo „Fidela filo de la bulgara popolo“ la 18-an de junio j. k., en la regiona biblioteko „A. S. Puŝkin“ estis solene inaŭgurita ekspozicio okaze de la 100-jara datreveno de la elstara bulgara revoluciulo kaj pachtalanto Georgi Dimitrov, aranĝita fare de Samarkanda Esperanto-klubo.

Per abundaj diversaj materialoj — fotoj, libroj, periodaĵoj, bildoj, dokumentoj k. a. la ekspozicio rakontis pri la vivovojo kaj la aktivado de G. Dimitrov.

Pri la ekspozicio informis la Samarkanda gazeto „Leninskij put“ („La vojo de Lenino“) en sia numero de la 18-a de junio 1982, emfazante ke preskaŭ ĉiuj ekspoziciaĵoj estas havigitaj de la bulgaraj esperantistoj. Aŭtoro de la artikolo estas A. Ionesov, prezidanto de la Soveto de Internacia Klubo „Esperanto“ en Samarkando.

La organizantoj de la ekspozicio esprimas koran dankon al siaj bulgaraj E-amikoj: Dimitar Denčev — redaktoro de „Kolektanto“, geedzoj el Sofio Dragica kaj Moni Benvenisti, Metodi Garev k. a., kiuj sendis ege interesajn materialojn kaj multe helpis tiun arangan de la Samarkanda E-klubo.

LENINGRADO:

La 17-an de junio j. k. en Leningrada Domo de amikeco kaj paco kun alilandaj popoloj okazis solena kunveno, dediĉita al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. La raporton „Georgi Dimitrov —

eminenta aganto de la bulgara kaj internacia komunista kaj laborista movado“ — faris la sekretario de la leningrada regiona komitato de KPSU V. G. Zaharov. La kunvenon ĉeestis ankaŭ la ĝenerala konsulo de PR Bulgario A. Todorov.

En la konferencsalono de la domo okazis renkontigo de la aktivularo de leningradaj esperantistoj kun la fame konata aganto de la bulgara kaj tutmonda E-movado — la poeto, verkisto kaj tradukisto Asen Grigorov. Kun varmaj salutvortoj al la gasto sin turnis la vic-prezidanto de ASE S. N. Podkaminer.

Asen Grigorov, kiu estis la unua persona sekretario de Georgi Dimitrov post liaveno en Bulgario, konigis al la ĉeestantoj multajn epizodojn, el kiuj pentrigis la potenca personeco de G. Dimitrov.

Respondante al la demandoj de la kunvenintoj, kio Asen Grigorov detale informis ilin pri la rilato de Dimitrov al la Esperanto-movado, al la agado de la bulgaraj esperantistoj. G. Dimitrov karakterizis la kontaktojn de la bulgaraj esperantistoj kiel kanalon por disvastigo de veraj informoj pri nova, socialisma Bulgario kaj kuragigis ilian aktivadon. Li praktike helpis la eldonadon de revuo „Internacia Kulturo“ kaj de aliaj publikaĵoj dum la malfacilaj unuaj postmilitaj jaroj, kiam en Bulgario ne sufiĉis papero kaj presejoj.

Asen Grigorov rakontis pri la multflanka helpo de la popola registaro al la bulgara E-movado, pri la oficiala decido por enkonduko de instruado de Esperanto en la IX kaj X klasojn de ĉiuj mezlernejoj en Bulgario, pri organizado de kursoj por E-instruistoj ktp.

Kiel ĵurnalisto kaj verkisto Asen Grigorov dividis sian propran sperton kun la ĉeestantoj pri la ekposedo de la Internacia Lingvo.

La leningradaj esperantistoj longe memoras tiun interesan renkonton kun la E-veterano Asen Grigorov!

Andrej RAKOV

NIJNEVARTOVSK:

La membroj de E-klubo „Samotlok“ aligis al la „Marŝo de Paco“ kaj amase sendis protestletojn al la ĉefa stabo de NATO en Bruselo (Belgio) kontraŭ la disvastigo de novaj nukleaj armiloj en Okcidenta Eŭropo. La leterojn subskribis 636 civitanoj, el kiuj — 300 esperantistoj kaj simpatianoj.

Similajn leterojn kontraŭ la minaco de nuklea milito la esperantistoj el Nijnevartovsk sendis al la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UNO pri malarmado. Ilin subskribis 888 partoprenantoj en porpacaj miloj.

Lige kun la 100-jariĝo de la fama komunista-internaciisto Georgi Dimitrov en kelkaj urbaj kluboj la nijnevartovskaj esperantistoj organizis ekspoziciojn. Estis aranĝita ankaŭ ekspozicio dediĉita al Gabrova regiono (Bulgario). Interesajn materialojn sendis geesperantistoj el Gabrovo kaj Asenovgrad, al kiuj la membroj de Nijnevartovska E-klubo kore dankas.

Amika kaj nobla konkurado ligas la klubojn de esperantistoj el la panuzino en Gabrovo kun iliaj samideanoj el Nijnevartovsk en interŝanĝo de interesaj materialoj pri la vivo de la soveta kaj bulgara popoloj.

J. ŜUVAJEV



En la komenco de aŭgusto 1982 forpasis la veterano de la bulgara E-movado **Nano V. Nanov**. Naskita en 1904 en vilaĝo Strupec, distrikto de Vraca, ankoraŭ en la junaĝo li eniris la batalvicojn de la Bulgara Komunista Partio, poste, veninte en Sofion, en 1931—1932 li estigis respondeca redaktoro de la partiaj gazetoj „Eho“, „Pogled“ kaj „Jupel“, pro kio li estis jetita en malliberejon, kie li pasigis 4 jarojn. Li estis aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj la milito, partoprenis kiel volontulo la Patrolandan Militon en 1944—1945. Post la milito li laboris en la Ministerio de Internaj Aferoj.

Nano Nanov esperantistigis en 1931 kaj ĝis sia morto estis aktiva E-gvidanto. En 1939 kune kun V. Cočov, li tradukis el la rusa lingvo kaj eldonis la konatan libreton de la soveta esperantisto E. Drezden pri Esperanto, partoprenis aktive la agadon de la Sofia E-societo „M. Gorkij“ antaŭ la milito kaj post ĝi kaj estis ĝia plej longtempa prezidanto. Li estis membro de la Centra kaj Urba estraroj, energia kaj sindona aktivulo ankaŭ de MEM.

La bulgara E-movado en lia persono perdis unu el siaj plej aktivaj agantoj.

En la fino de junio 1982 forlasis niajn vicojn **Stefan Atanasov Venkov**, naskita en 1903.

Li aliĝis al nia movado post la Unua Mondmilito, estis aktivulo de la Junulara E-grupo en sia naskiĝurbo Ljaskovec kaj gvidis kursojn de Esperanto tie kaj aliloke. En 1924 li verkis kaj disvastigis ardan alvokon por Esperanto.

En 1929 li finis siajn studojn de filozofio en la Sofia Universitato, poste — ĵurnalistan lernejon en 1948 kaj Partian Universitaton.

Li estis sinsekve direktoro de gimnazio kaj instruisto en diversaj gimnazioj. Persekutata kaj plurofoje eksigata laŭ la faŝista Leĝo por Defendo de la Ŝtato, en 1943—1944 li estis en koncentrejo.

Post la socialisma revolucio en 1944 li estis direktoro de gimnazio en Gorna Orjahovica, direktoro de la Instituto por Instruistoj en urbo Dupnica (nun Stanke Dimitrov), redaktoro en la redakcio de la partia organo „Rabotniĉesko Delo“ kaj en la eldonejoj „Nauka i Izkustvo“ kaj „Medicina kaj Fizkultura“.

En la memoro de ĉiuj, kiuj lin konis, li restos modesta, laborema, helpema kaj sindona kulturaganto.

Je la 12-a de septembro 1982 ĉesis bati la koro de la arda esperantisto-veterano el Ruse — **Sava Savov Ivanov**.

Dum 1929—1930 li estis prezidanto de la laborista

E-societo „Laborista Stelo“, organizis senpagan kurson por lernado de la Internacia Lingvo. La kursanoj estis precipe membroj de la Laborista Junulara Organizaĵo.

Membro de BKP de 1932. Sava Ivanov partoprenis aktive en la kontraŭfaŝista batalo.

Post la Naŭa de Septembro 1944 li dediĉis multajn fortojn kaj tempon al la E-movado.

Niajn kondolencojn al la funebrantaj familianoj.

La 3-an de julio j. k. forpasis la talenta aktoro kaj ĉarma homo **Gerasim Mladenov**.

Malgraŭ sia tre granda okupateco en la teatro kaj sur la amuzpodo, li ĉiam trovis tempon por lerni rolojn ankaŭ en Esperanto kaj per sia majstra plenumo gajnis la admiron kaj la rekonon de la bulgara kaj de la internacia esperanta publiko.

Gerasim Mladenov estis unu el la fondintoj de la Bulgara Esperanto-Teatro. Jam en la unua spektaklo de tiu ĉi teatro en 1958 G. Mladenov, en la rolo de la urbestro el la komedio „Analfabeto“ de Branislav Nuŝiĉ, gajnis la korojn de la spektantoj-kongresanoj de la BEA-kongreso en Varna. Pli malfrue en la rolo de Stanĉo Kvasnikov el la komedio „Casantoj de oficoj“ de Ivan Vazov, li estis merite aplaudita de la multmila internacia publiko dum la universalaj E-kongresoj en Varsovio, Split kaj Sofio. Oni ĉiam memoris liajn brilajn plenumojn de ĉefroloj en „Komedio de eraroj“ de Sekspiro, „Akridoj“ kaj „Virina regno“ de St. L. Kostov, k. a.

Gerasim Mladenov posedis brilan komedian talenton kaj lia aĵero sur la scenejo ĉiam provokis ridon, bonhumoron, plezuron kaj ĝojon. La publiko ĉiam atendis lin kun amo kaj danko.

La bulgaraj geesperantistoj konservas en sia konscio la memoron pri la bonega aktoro kaj nobla homo Gerasim Mladenov.

La 14-an de junio j. k. forpasis **Ivan Jankov** — la plej maljuna esperantisto en Sumen kaj Sumen-distrikto.

12-13-jara knabo, li ĉeestis la fondiĝon de la E-societo „Vekigo“ en Sumen en 1905 kaj dum multaj jaroj li senĉese kaj aktive laboris por popularigo de la Internacia Lingvo kaj de ĝiaj noblaj porpacaj ideoj.

Ni kliniĝas antaŭ lia memoro.

La 8-an de julio 1982 forpasis en Ruse **Georgi Dragostinov Bojkov**, 74-jara, multjara aktivulo en la loka E-movado kaj eksprezidanto de societo „Libero“.

Ni esprimas nian profundan kondolencan al la funebranta familio.



DEZIRAS KORESPONDI

IRANO

S-ro Rahim Davari (22-jara) — Ketab Feruŝiye Mirzakhani, Bonab.

S-ro Bahram Esmailian (22-jara studento) — Bonbast-E-Chitra 99. Abiverd st., Zafar st. Teheran 19198 — pri paco.

JUGOSLAVIO

Dizdarević H. Jusuf (instruisto) — JU 72000 Zenica E. L. „Omer Maslić“, Babino.

Arnaut Enes (lernanto 15-jara) — 72000 Zenica — Arnaut.

Muslić Mujesira (13-jara lernantino) — JU 72000 Zenica — Briznik.

Karić Senija (13-jara lernantino) — JU 72000 Zenica — vilaĝo Mulići.

Agić Muniira (13-jara lernantino) — JU 72000 Zenica, vilaĝo Puhovac.

Pašalić Emir (10-jara lernanto) — JU 72000 Zenica — vilaĝo Puhovac.

Mijućinović Mirsad (13-jara lernanto) — JU 72000 Zenica, E. L. „Omer Maslić“, Babino.

Pašalić Sulejman (14-jara lernanto) — JU 72000 Zenica — vilaĝo Puhovac.

Muslić Sukrija (13-jara lernanto) — JU 72000 Zenica, vilaĝo Briznik.

MONGOLIO

Ulan Bator, Bag Tajrog-55, Centra Palaco de Sporto, „Sportin Medeo“ — ĵurnalo, C. Tuvŝin Zajaa-d.

POLLANDO

Marian Czachor (20-jara) Dobrynin 55, 39-322 Rzemleń — kun bulgaraj samguloj pri distra muziko — rock, country, disco, pri tilatelo kaj turismo.

Aliya Józwa (42-jara ekonomistino) — Wrocław, 54-220, str. Bobka 16 m 16 — kun ĉi pri PM.

SOVETUNIO

Igor Kovalov (16-jara) — ul. Lubčkovaj II, p. Gorjačevodskij, 357560 — Pjatigorsk — kun ĉi.

Membroj de E-klubo de Internacia Amikeco ĉe Tomska Altlernejo kun komuna adreso: 634041 Tomsk-41 a/k 261: Ing. Basov Genadij (25-jara) — pri radio-

amatoreco, komputado, E-temoj k. a.; Sijafer Aleksandr (26-jara matematikisto, E-instruisto) — pri

matematiko, lingvoj (Esperanto, angla, franca, ido k. a.), interlingvistiko, Esperantologio, muziko (gitaro, bango, ĵazo); Ivanova Olga (20-jara studentino

de pedagogia instituto) — kun ĉi pri ĉi; Jadriski-kova Svetlana (19-jara studentino) — pri literaturo,

subakva sporto, insignoj; Uljanov Aleksandr (14-jara lernanto) — kun ĉi pri karateo, arto, moderna

muziko, E-ajoj, ebla reciproka gastado; Ondar Kama (21-jara studentino de medicina instituto) — pri

muziko, turismo, terapio, BK; Su Nelli (22-jara inĝeniero-kemiistino) — kun ĉi pri literaturo, muziko,

kemio de malmolaj hejtajoj, interŝ. BK, E-ajojn Sijafer Irina (23-jara inĝeniero-kemiistino, E-instruistino) — pri E-instruado, kuirarto, dancoj

moderna muziko, eduko de demaskaj esperantistoj-infanjoj, interŝ. E-literaturo, E-ajojn; Obrazcov Viktor (19-jara studento-medicinisto) — pri reflekso-

terapio, psikologiaj testoj, moderna kaj klasika muziko, turismo, interŝ. BK, E-ajoj; Kurbanova Nar-

giz (17-jara lernantino) — kun ĉi pri lingvoj, muziko, literaturo, matematiko; Ivanov Igor (14-jara lernanto) — pri moderna kaj klasika muziko, turismo,

karateo, PM.

NIAJ PERANTOJ

Britio, Coverham Louth, Lincs. LN11 0PF

„Laycroft“, Main Road, s-ro Paul Hewitt

Jarabono: 250 f. ster.

Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperant-Asocio, Jilská 10, 110 00

Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmerova 35/1, Esperant-

tisto Slovaka, Daniel Pařak.

Danlando, Torholmsvej 26, 9800 Hjørring

s-ro J. H. Eriksen

Poŝtkonto 1 48 39 51

Jarabono: 37,98 kr.

Francio, F-54510 Tomblaine, B. P. 23,

s-ro Roger Degrelle

girkonto 771.77 R, NANCY

Jarabono: 20 f. f.

Finnlando, PL 221, SF — 70101, Kuopio 10,

Finna Esperanto libroj

Jarabono 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko,

108 Berlin, Charlottenstr. 60,

Der Esperantist

Centra Laborrondo Esperanto

Germana Federacia Respubliko,

Esperanto-Centro Humanismo

Roland H. Hegen,

Schlossgasse 30

D — 6738 Elmstein

Jarabono: 8 gmk

Hispanio, Adonis Gonzalez Meana

str. Marcellino González, 5-4° -doh.

Gijón (Asturias)

Jarabono: 300 pesetoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“,

p. k. 153, H-1443 Budapest

Japanio,

s-ro Yoshiaki Mizuno

327, Kitairiso

Sayama shi,

Saitama-ken

350-13 Japan

s-ro Nanba Syōzi

Huruiti 3-13 26

Yōtō-ku, Osaka

536 JAPAN

Jarabono: 5 us. dolaroj

aŭ egalvaloro

Kubo, Ciego de Avila,

ajartado 223, Pedro P. Lamas Díaz

Madagaskaro,

s-ro Justin Randriamampionona,

Lot: VA 20-BA Tsiašana

101, Antananarivo

Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro

Malta, 20, Valletta Road,

Quormi,

s-ro Anthony Mercleca

Jarabono: 5 us. dolaroj aŭ egalvaloro

Pollando,

ul. Piekna 26 b/g

PL-0539 Warszawa,

s-ro Lech Fosiński

Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao

Couto, 6 R/C, A P — 1500 Lisboa

Jarabono: 260 esk.

Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio 200016 Tallin, Estonio, do vostrebovanija

Johannes Palu

Jarabono: 5 rubloj

Svedio, Lingvägen 201,

S-12359 Farsta

s-ro Tord Suård

Jarabono: 3 us. dolaroj aŭ egalvaloro

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

KIA ESPERANTISTO VI ESTAS?

Verŝajne vi konsentas, ke la esperantistaro konsistas el multaj kategorioj, malgraŭ tio, ke oni ofte nomas ilin „samideanoj“. Ni volas prepari tiujn kategoriojn, kvankam ne eblas garantii, ke ni nomas ĉiujn.

1. **BONAN-TAGON-ESPERANTISTOJ.** Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekz.: „bonan tagon“, „kiel vi fartas?“, „ĝis revido“. Cetere ili ĉiam parolas nur nacilingve. Tre ofte ili portas tre grandan verdan stelon.

2. **ETERNE NOVAJ ESPERANTISTOJ.** Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili malmulte progresas. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝiĝas kaj ne scias respondi. Ĝenerale ili tre flue parolas nacian lingvon en Esperanto-kunvenoj.

3. **F.LATEL ST-ESPERANTISTOJ.** Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

4. **VORTAR-ESPERANTISTOJ** aŭ **PROMENANTAJ VORTAROJ** kontraŭe scias multe da Esperanto-vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskaŭ neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron (krom vortaron) kaj ne ŝafas korespondi.

5. **GAZET-ESPERANTISTOJ** opinias, ke ĉiu, kiu pli-malpli scias Esperanton, havas taskon verki gazet-artikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn. Iliaj planirakoj ne bongustas. Verŝajne postulas apartan talenton.

6. **KLUB-ESPERANTISTOJ** loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrikto, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongresoj.

7. **KONGRES-ESPERANTISTOJ** plejparte estas fraŭloj (amand-seksaj), loĝantaj izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis Internaciaj kongresoj. Sed en propra loko, urbo aŭ vilaĝo ili estas kaj daŭre restos la sola esperantistoj.

8. **GRAMATIK-ESPERANTISTOJ** fervore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole ĝustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne laŭ iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas ruĝan kraĵon en la mano.

9. **NUR-ESPERANTISTOJ** estas homoj, por kiuj la Zamenhofa kreaĵo estas solĝusta vivocelo. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniam ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelaĵajn ringojn, manikbutojn, poŝtrancilon, kraĵonon, eĉ noktovesoj estas ornamitaj kvinpintsteloj. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri Esperanto, ĉiun ili salutas Esperantlingve. Ili estas la plej bonaj **KONTRAŬ-PROPAGANDISTOJ** de nia movado.

10. **OPOZICI-ESPERANTISTOJ** ŝatas aŭdi sin mem, sed oni malmulte povas diri, se oni samopinias kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la ago de la plimulto. Ili amas fortaĵajn, akraĵajn kvalifikaĵojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en nia organizo estas trompantoj aŭ proflitemuloj, aŭ diktatoroj.

11. **KRITIKEMAJ ESPERANTISTOJ.** Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taŭgas krom ili mem. La saĝa leganto verŝajne jam konstatis, ke la verkinto de ĉi tiuj linioj estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉi-lasta kategorio. Ĉu vi, leganto, jam renkontis vian prireton? Aŭ ĉu vi apartenas al la 12-a kategorio?

12. **LA ORD NARAJ ESPERANTISTOJ** estas „progresemaĵoj“, kiuj interesiĝas pri militaj aferoj, interalie **ANKAŬ PRI ESPERANTO**. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastiĝi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por kontraŭi por reciproka ekkono de la popoloj per lia amikiĝo, per konservo de la paco, por batalo kontraŭ la milito, per konservo de la tuthomara kulturo.

OGAL (Nederlando)



Ĉu vi povas malkaŝi la dek diferencojn inter ambaŭ desegnaĵoj

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVIANSKI

prof. Vasil ĈOČOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARU,

CIN, Flori NIKOLOV

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919
distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado.
Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, BulgarioP. K. 66
1000 Sofio

tel. 31-70-19

Prezoj „Georgi Dimitrov“ (il bazo)